# Pri IKEF


## Omaĝe al la 107-a UK

Johano Huang

5/29/2022


# La Historio de IKEF


Jam en la 1910-aj jaroj estis esperantaj revuoj kaj libroj kun komercaj anoncoj kaj aperis vortaroj kun komercaj vortoj kaj esprimoj.




**Prahistorio**








| 1914 Komerco kaj Industrio | 1918 Listo | 1922 Komerca Korespondo | 1921 Komerca Votaro |
|---|---|---|---|

# Prahistorio

- En 1919, reviviĝas la Esperantista klubo en Brno (la dua plej granda urbo de Ĉeĥio), kaj profesoro Inĝ. Vincenc Kroužil plurfoje prelegis pri Esperanto kaj gvidis kursojn en Industria lernejo kaj Komerca Akademio.




# IKEF havis antaŭulon



Egidius Lucas Maria Wensing



Erik Carlen



Bruno Vogelmann





Internacia Komerca-ekonomika Vortaro

Temis pri Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), kies estraranoj, E.L.M. Wensing (Nederlando), Erik Carlen (Svedio) kaj Bruno Vogelmann (Germanio) agadis en la 60aj kaj 70aj jaroj, kaj eldonis je la Internacia Komerca-ekonomika Vortaro.

# Novaĵletero de IKEF

- Post EKI-a tempo, en 1984 nova generacio ekintencis revivigi la uzadon de Esperanto en komerco. Ili iniciatis sondadon de opinioj inter la fakdelegitaro de UEA. La reagoj estis tiom multnombraj ke, por grupe respondi, en aŭgusto 1984 eldoniĝis la unua Laŭokaza Novaĵletero de IKEF (antaŭulo de La Merkato).













La Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo estis fondita en 1985 laŭ iniciato de s-roj Franz Josef Braun (Germanio), Lawrence Mee (brito loĝanta tiam en Roterdamo, Nederlando) kaj Roland Rotsaert (Belgio).Unua laborkunsido okazis en Brugge, Belgio, en aprilo 1985. La fondkunveno okazis dum la 70a Universala Kongreso en Augsburg, Germanio, la 6-an de aŭgusto 1985, kun 30 partoprenantoj.






Franz Josef Braun Lawrence Mee Roland Rotsaert

Unua generacio de IKEF aktivinta en UK-1999 en Berlino, dekstre de Franz Braun (Germanio), Roland Rotsaert (Belgio), Francois Gilbert (Francio), Robert Ebenau (Belgio), Yamasaki Seik (Japanio).En 2000, la nombro de IKEF membroj estas proksimume 150.



# La Faka Asocio de UEA

Dekomence la membraro de IKEF sufiĉe rapide kreskis. Ok jarojn post la fondo ĝi trapasis la membronombron 100. Sekve de tio UEA akceptis IKEF dum la 79a UK en Seulo, Koreio kiel aliĝintan fakan asocion en 1994.






IKEF daŭris sen ĉefo ĝis 2010 ekde la demisio de sia fondinta prezidanto Franz Braun en 2005. En 2010 Ĉina Esperantan komercisto s-ro Ĉielismo Wang Tianyi anoncis al IKEF sin kiel prezidanto-kanditato, kaj poste estis elektita kiel la nova prezidanto de IKEF.



Dekstre prez. Franz Braun kun membro Radenko Milosevic(Kroatio) en UK




s-ro Ĉielismo Wang Tianyi







# IKEF ŝanĝis sian nomon

- En 2017 dum sia unua komuna konferenco okazinta en Seulo, IKEF aprobis sian novan statuton kaj ŝanĝis sian nomon de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo al Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio.




# La 2018 Komuna Kongreso


- La 2a komuna konferenco(KK) de IKEF okazis dum la 2a, 3a kaj 4a de Nov. 2018 en la urbo Changzhou (Ĉanĝuo) okcidente apud Shanghai.





# La 2019 Komuna Kongreso

- La 3a komuna konferenco(KK) de IKEF okazis de la 13a ĝis la 16a de Aŭg. 2019 en la urbo Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio. Temo: Kiel Esperanto kunfandas kaj servas ekonomian evolution ?




# La 2020 Komuna Kongreso

- Pro la pandemio, la 4a komuna konferenco(KK) de IKEF okazis en la 26a kaj la 27a de Dec. 2020 en la reta mondo per Zoom. Temo: Kontaktu Ni reciproke bone kontraŭ mondsufero!





# La 2022 Komuna Kongreso

- La 6a komuna konferenco(KK) de IKEF okazos 12a - 16a Sep. 2022 en la urbo Kioto, la antikva kapitaro kaj nuna " IT urbo " de Japanio.

**Statuto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio(IKEF)**

(Aprobita de la Unua Komuna Konferenco de IKEF dum 2017-07-20/22 en Seulo)

1. **Celo**: Utiligo de Esperanto por komerco kaj ekonomio. Konstruado de aplika sistemo de Esperanto paralele al la tradicia Esperanto-movado.
2. **Strukturo kaj kotizo**: IKEF konsistas el filioj landaj kaj fakaj, membroj entreprenaj, individuaj, interretaj kaj dumvivaj.

2.1. **Landaj kaj fakaj filioj** konsistas minimume el 5 siaj membroj, kaj nuntempe ne pagas la kotizon, sed havas devon inviti la jarkunvenon de IKEF. La prezidanto de ĉiuj filioj aŭtomate fariĝas estrarano de IKEF.

2.2. **Entreprena membro** pagas sian jarkotizon por 100EUR, kaj senpage prezentas kaj reklamas sian varon okaze de la jarkunveno de IKEF kaj pere de retgrupoj kaj informiloj de IKEF.

2.3. **Individua membro** pagas sian jarkotizon por 10EUR, kaj rajtas fariĝi kandidato de la estrarano de IKEF. Se ĝi ne daŭre pagis dufoje, aŭtomate fariĝis la interreta membro.

2.4. **Interreta membro** ne pagas jarkotizon, sed devas pagi aliĝkotizon unufojan por 10EUR kaj aliĝi al IKEF-retgrupoj (komerco@googlegroups.com) aŭ (per-esperanto-komerco@yahoogroups.com).

2.5. **Dumviva membro** pagas totalan kotizon unufoje por 200EUR.

3. **Estraro kaj respondeco**: Ĝi konsistas el la honora prezidanto, prezidanto, vicprezidantoj, ĝenerala sekretario, estraranoj el siaj filioj kaj individuaj membroj. La honora prezidanto estas nur titola pro sia kontribuo al IKEF, prezidanto planas la jarlaboron kaj inspektas financon de IKEF; vicprezidantoj respondecas apartan kontinenton aŭ fakan agadon; ĝenerala sekretario zorgas ĉiutagan taskon ĉefe por kolekti la membrokotizon kaj eldoni informilon Merkato(PDF); estraranoj respondecas sian agadon landan aŭ fakan. Ĉiu filio rajtas havi siajn delegitojn sublandajn aŭ subfakajn. La unu periodo de la prezidanto estas por 4 jaroj.
4. **Jarkunveno kaj kunsido**: La oficiala jarkunveno estas la komuna konferenco de IKEF. Dum la jarkunveno la prezidanto kaj ĝenerala sekretario raportas siajn laborojn. Ĉiu filio rajtas havi sian jarkunvenon aŭ kunsidon kadre de sia lando aŭ fako, kaj rajtas aperi en diversaj okazoj nome de IKEF cele por propagandi nian IKEF.
5. **Statuta korektigo**: Ĉi tiu statuto estas korektebla okaze de la jarkunveno.



Ekvalida de la 22a de Julio 2017

Subskribita de prezidanto Chielismo WANG Tianyi



# La celo de IKEF

- Laŭsia statuto, la Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) celas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en la kampojdekomerco, ekonomio kaj ekonomia scienco. Ankaŭ celas al la konstruado de aplika sistemo de Esperanto paralele al tradicia Esperanto-movado.


# La Honora Prezidanto de IKEF

- Roland ROTSAERT (naskiĝis la 12-an de junio 1950 en Bruĝo, Belgio) estas esperantisto ekde 1979 kaj estis dum longa tempo estrarano pri financo de Flandra Esperanto-Ligo. Krome li okupiĝis pri la biblioteko Fondaĵo Vanbiervliet en Kortrejko (Kortrijk) kaj la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF). Li estas redaktoro pri ekonomio de la magazino MONATO ekde 1992.S-ro Roland Rotsaert estas la Honora prezidanto de IKEF.








# La Prezidanto de IKEF

- S-ro Chielismo Wang Tianyi de Ĉinio naskiĝis en 1957, kaj estas profesia komercisto internacia per Esperanto pli ol 20 jarojn. Li estas direktoro de Xi'an Da Vinci Importa kaj Eksporta Kompanio Lta, la nuna prezidanto de IKEF, kaj prezidanto de Xi'an-a Esperanto-Asocio.



# Komandejo

- Jen la nova komandejo kaj la estraro de IKEF. Nun mi mallonge prezentas ilin al vi.



**Ĉielismo**
WANG Tianyi
Prezidanto
ĝenerala kontrolo de la laboro de IKEF



**Ludoviko**
ZHAO Chenghua
Vicprezidanto
edukado kaj kursado



**Diablego**
KIM Yonjin
Vicprezidanto
Internacia rilato kaj komerco



**YASS**
Yas Kawamura
Vicprezidanto
interreta servo kaj retbanka afero



**Longarko**
ZHANG Changsheng
Financa revizoro
kontroli financan staton de IKEF



**Enkĉjo**
Enkhee Chimendtseren
Ĝenerala sekretario
ĉiutaga aranĝo de diversaj aktivoj



**Fabricio**
Fabricio Valle
Akademia direktoro
informilo" Merkato", kaj prepari IKEF-Kolegion



IKEF
Nova estraro de IKEF por la jaroj 2022-2025
Komandejo kun 7 personoj
1, Prezidanto: Chielismo WANG Tianyi(ĝenerala kontrolo de la laboro de IKEF)
2, Vicprezidanto: Ludoviko ZHAO Chenghua (edukado kaj kursado)
3, Vicprezidanto: Diablego KIM Yonjin(Internacia rilato kaj komerco)
4, Vicprezidanto: Yas Kawamura (interreta servo kaj retbanka afero)
5, Financa revizoro: Longarko ZHANG Changsheng(kontroli financan staton de IKEF)
6, Ĝenerala sekretario: Enkhee Chimendtseren ( ĉiutaga aranĝo de diversaj aktivoj)
7, Akademia direktoro: Fabricio Valle(informilo Merkato kaj prepari IKEF-Kolegion)
Sekretariejo kun 6 personoj
1, Ĝenerala sekretario: Enkhee Chimendtseren (ĝenerala kontrolo)
2, Vicĝ.sekretario: Surush Mohammadzadeh(azia afero)
3, Vicĝ.sekretario: Vojteko Wojciech Misiara( eŭropa afero)
4, Vicĝ.sekretario: Johano Huang Xiaolong(Amerika afero)
5, Vicĝ.sekretario: Grando ZHANG Wei (turisma laboro)
6, kontisto: Tuul Khurlenbaatar (IKEF-MN)
La 4a estraro ekfunkcias de la jaro 2022 ĝis la jaro 2025.
Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio(IKEF)
La 6a de Marto 2022 okaze de la 5a KK de IKEF
subskribe eldonita de prezidanto Ĉielismo WANG Tianyi

Ĝenerara sekretario
Enkhee Chimendtseren
ĝnerala kontrolo

Vicĝ.sekretario
Sursh Mohammadzadeh
azia afero

Vicĝ.sekretario
Wojciech Misiara
eŭropa afero

Vicĝ.sekretario
Johano Huang Xiaolong
amerikaj aferoj

Vicĝ.sekretario
Grando: ZHANG Wei
turisma laboro

kontisto
Tuul Khurlerbaatar
IKEF-MN

# La Sekretario de IKEF

- Ekzistas sekretario kun 6 personoj:
- Enkhee por ĝenerala kontrolo; Suruŝ por azia afero; Vojteko por Eŭropa afero; Johano por Amerika afero; Grando por turisma laboro; Tuul kiel kontisto

# Dumviva membro de IKEF

Nuntempe, ekzistas 20 dumvivaj membroj de IKEF, inkluziva de s-ro Andy Blair de Halifax Kanado kaj S-ro Michel Basso de Wintzenheim, Germanio ĉi jare.

| | | |
|---|---|---|
| 1991 | Van den Kieboom | Walter: Oostende |
| 1991 | WANG | Chielismo Tianyi: Xi'an |
| 1994 | Li | Renzhi Eruda: Hong Kong |
| 1993 | Shang | Junyi: Chengde |
| 1997 | Huang | Zheng Su: Hefei |
| 1997 | Zheng | James: Bangkok |
| 1998 | Pirlot | Germain: Oostende |
| 1999 | Arthur | Alfred Kobina: Accra |
| 2004 | Hornecker Achim: Kenzingen | |
| 2007 | LIU | Tieshan: Changsha |
| 2017 | Yass | Kawamura: Kyoto |
| 2017 | Naoko | Fujiwara: Kyoto |
| 2018 | Makoto | Fujiwara: Kyoto |
| 2018 | Chika | Kawamura: Kyoto |
| 2019 | TakahiroFujiwara: Kyoto | |
| 2019 | Gen | Kawamura: Kyoto |
| 2020 | Enkhee | Chimedtseren: Ulaanbaatar |
| 2021 | Aleksandar Zahariev: Sofia | |
| 2022 | Andy Blair: Halifax | |
| 2022 | Michel Basso: Wintzenheim | |




Andy Blair




Michel Basso

# Jarkotizo

- Individua membro pagas sian jarkotizon por 10EUR, kaj rajtas fariĝi kandidato de la estrarano de IKEF.

## Jarkotizo laŭ sia membreco

Landaj kaj fakaj filioj konsistas minimume el 5 siaj individuaj membroj de IKEF, kaj La prezidanto de ĉiuj filioj aŭtomate fariĝas estrarano de IKEF.

La estraranoj kaj sekretarianoj de IKEF devas esti individua aŭ dumviva membro de IKEF.

Entreprena membro pagas sian jarkotizon por 100EUR, kaj senpage prezentas kaj reklamas sian varon okaze de la jarkunveno de IKEF kaj pere de retgrupoj kaj retejo de IKEF.

Individua membro pagas sian jarkotizon por 10EUR, kaj rajtas fariĝi kandidato de la estrarano de IKEF. Se ĝi ne daŭre pagis dufoje, aŭtomate fariĝus la interretan membron.
Partoprenontoj de DK, SK, KK, AMO kaj diversaj renkontiĝoj realaj, kaj virtualaj, selektu tiun kategolion, sed ne selektu " Interreta membreco"-n, dankon!

Interreta membro ne pagas jarkotizon, sed devas pagi aliĝkotizon unufojan por 10 EUR kaj aliĝi al IKEF-retgrupoj (komerco@googolegroups.com) aŭ (per-esperanto-komerco@yahoogroups.com).
Partoprenontoj de DK, SK, KK, AMO kaj diversaj renkontiĝoj realaj, kaj virtualaj, ne selektu tiun kategolion, sed selektu " Individua Membro"-n, dankon!

Dumviva membro pagas totalan kotizon unufoje por 200EUR.

# La Filioj de IKEF

- Nuntempe, ekzistas 22 landajn filiojn tra la mondo, inkluzive de Ĉinio, Irano, Brazilo, Koreio, ktp. Ekzemple, S-ro Surush estas la prezidanto de la IKEF-irano.



CERTIFIKATO DE IKEF-SUD-AFRIKO

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO(IKEF) AGNOSKAS LA EKZISTON DE IKEF-SUD-AFRIKO KIEL LANDA FILIO, KAJ NOMUMAS SINJORON EMILE MALANDA NIANGA KIEL LA PREZIDANTON, KIU RAJTAS ORGANIZI KOMERCAN KAJ EKONOMIAN APLIKADON DE ESPERANTO EN SUD-AFRIKO KAJ SUDAFRIKA REGIONO.



CERTIFIKATO DE IKEF-BRAZILO

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FEDERACIO (IKEF) AKCEPTIS LA PETICION DE IKEF-BRAZILO KIEL LANDA FILIO KAJ NOMUMAS SINJORON FABRICIO VALLE KIEL LA PREZIDANTON DE IKEF-BRAZILO.KIU RAJTAS ORGANIZI KOMERCAN KAJ EKONOMIAN APLIKADON DE ESPERANTO EN BRAZILO.





CERTIFIKATO DE IKEF-TANZANIO

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FEDERACIO(IKEF) AGNOSKAS EKZISTON DE IKEF-TANZANIO KIEL LANDFILION KAJ NOMUMAS S ROIN CHARLES KIMWERI HIZA KIEL PREZIDANTON ALOYCE AMBROSE MAGARI KIEL Ĝ.SEKRETARION KIUJ RAJTAS ORGANIZI KOMERCON KAJ AKTIVON NOME DE IKEF EN TANZANIO.



CERTIFIKATO DE IKEF-TANZANIO

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FEDERACIO(IKEF) AGNOSKAS EKZISTON DE IKEF-TANZANIO KIEL LANDFILION KAJ NOMUMAS S ROIN CHARLES KIMWERI HIZA KIEL PREZIDANTON ALOYCE AMBROSE MAGARI KIEL Ĝ.SEKRETARION KIUJ RAJTAS ORGANIZI KOMERCON KAJ AKTIVON NOME DE IKEF EN TANZANIO.






CERTIFIKATO DE NORDAMERIKA IKEF-FILIO

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FEDERACIO (IKEF) AGNOSKAS LA EKZISTON DE LA NORDAMERIKA IKEF-FILIO KAJ NOMUMAS SINJORON JOHN HUANG XIAOLONG KIEL PREZIDANTON, KIU ORGANIZAS LA KOMERCON KAJ APLIKADON DE ESPERANTO EN LA KONTINENTO NORD-AMERIKO.

IKEF









- Kaj mi estas la prezidanto de IKEF nordameriko. Ni havas nian propan retejon je www.ikef.net Ni havas multajn da agadoj.

# Agadoj de IKEF

- Jen la agadoj de IKEF:
- - helpi membrojn kiuj uzas Esperanton en siaj komercaj rilatoj
- - eldoni ĝisdatigitajn fakajn terminarojn
- - ebligi renkontiĝojn de membroj, organizi studseminariojn kaj aliajn eventojn
- - eldoni fakan revuon aŭ bultenon kaj subteni tiuspecajn eldonadojn
- - aperigi fakajn artikolojn en la Esperanta gazetaro
- retlisto Komerco por esperanto-parolantaj komercistoj.






# La dimanĉaj kunvenoj

- Unu grava agado de IKEF estas organizi la dimanĉajn kunvenojn per Voov ĉiu dimanĉe por kunligi esperantajn komercistojn tra la mondo.


# Miaj Prelegoj

- Mi persone faris serion da prelegoj pri la dimanĉaj kunvenoj. Unu el ili temas pri mia propra ajlo-komerco. Mi ankaŭ prelegis pri aliajkomercaj temoj, ekzemple la bazaj terminoj en internacia komerco, kaj bitmono.










# Sezona kunsido

La Sezonaj Kunsidoj de IKEF laŭeble, okazas 1 foje po ĉiu 3 monatoj.





# AMO

- Aktivula Maturigo (mallonge AMO) estas programo de Universala Esperanto-Asocio, kiu celas altigi la konojn kaj kapablojn de siaj aktivuloj tra la mondo. Dum la AMO, informoj kaj la ejo por demandi al prelegintoj, kaj respondoj de prelegintoj ankaŭ troveblas. La 30-an de majo, 2021, okazis AMO73 rete sukcese. Ĉielismo kaj kelkaj IKEF-anoj parolis. Mi prelegis pri mia ajla komerco dum la kunsido.



# Libroj de IKEF




- Dum la jaroj IKEF eldonis iom da gravaj komercaj libroj, ekzemple la “Inkotermoj 2000” kaj “Dokumentaj Kreditoj” de IKEF kaj ICC (Internacia Komerca Ĉambro). Ĉar ili estas relative malmodernaj, mi planas ĝisdatigi ilin estonte.

# La revuo de IKEF

- La Merkato estis la revuo de IKEF ek de 1984 ĝis 2011. Ĉi jare, IKEF planas denove eldoni ĝin. La revuo koncentriĝas pri la ekonomiaj, financaj kaj komercaj novaĵoj kaj artikoloj rilataj al la Esperantujo.

numero 100

aprilo 2011

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

## La Merkato

ISSN 0941-9306

**Enkonduko**

Karaj IKEF-membroj kaj -simpatiantoj,

La centa numero de La Merkato verŝajne ankaŭ estas la lasta. Iam estis kvar numeroj jare, sed nun malfacilas plenigi eĉ unu numeron. Ĉar preskaŭ ĉiuj IKEF-membroj havas retaliron, povas sufiĉi la rubriko 'Novajoj' je www.ikef.org. Por membroj sen retaliro eblas unu aŭ du fojojn jare sendi kelkajn printitajn foliojn.

Nur en Ĉinio estis menciinda aktivado de IKEF dum la jaro 2010. Estus normale ke ankaŭ la sidejo de IKEF translokiĝus al tiu lando. Nia ĉina peranto, s-ro Wang, intencis kandidatiĝi kiel prezidanto dum la ĉijara UK en Kopenhago, sed li ne kapablos ĉeesti la kongreson. Li tamen venontjare estos en Hanojo kaj tie kandidatiĝos.

Roland Rotsaert, kasisto

**Enhavo**

Mesaĝo de s-ro Wang .................................. 2
Raporto pri la agado de IKEF dum 2010 - IKEF dum UK ...... 3-4
Raporto pri IKEF-Ĉinio 2010 ........................... 4-5
Bilanco - spezokonto .................................. 6
Likelemba - la afrika formo de tontino ..................... 7-8



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) [nur en aprilo en 2010] kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi.
**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Roland Rotsaert, Marie Popelinplantsoen 3 bus 0402, 8000 Brugge, Belgio
retpoŝto: roland.rotsaert@gmail.com.

**Membrokotizo** provizore ne plu estas postulata.


**Kontoj** ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*

**Interreto**: www.ikef.org (rekte: http://sites.google.com/site/ikefesperanto/)

**Mesaĝo de s-ro Wang (Ĉielismo)**

Antaŭ ol verki ĉi tiun tekston, mi ricevis kuraĝigan mesaĝon de la brazila peranto kaj estrarano de IKEF, s-ro Silvio Mates, kaj ankaŭ okaze de aliaj korespondoj kaj renkontiĝoj kun niaj estraranoj mi ricevis kuraĝigon ke mi kandidatiĝu kiel prezidanto de IKEF. Sincere mi deziras fariĝi prezidanto de IKEF, al kiu mi aktivas de mia juneco ĝis nun nejuna komercisto. Pardonon ke mi ne tuj prenu ilian kuraĝigon pro tio ke mi opinias, ke la prezidanteco devas ĉiujare ĉeesti nian Jarkunvenon okaze de UK, ĉu ne? Pasinte mi planis kandidatiĝi ĉijare en nia JK okaze de UK 2011 Kopenhago. Sed laŭ nuna stato mi ne povas, ĉar ĉijare mi estas okupita de translokigo de mia loĝejo, preparo de geedzigo de mia filino, kaj pli grava evoluigo de mia negoco. Mi deziras kandidatiĝi kiel prezidanto en la jaro 2012 okaze de Jarkunveno kadre de UK en Vjetnamio. Se estus neceso, mi nun deziros fariĝi provizora prezidanto de IKEF. Mi havu grandan honoron servi al nia estraro kaj IKEF!

# "Komerco", la oficiala diskutlisto de IKEF





- Pere de retlisto ĉe Google Groups ni interŝanĝas mesaĝojn, anoncojn kaj ideojn rilate al komercaj aferoj. La ligo estas la jena:http://groups.google.com/group/komercoPartoprenu kaj ricevu la mesaĝojn en via retadresa kesto. Simple, facile kaj rapide.

# La retejo de IKEF


- La oficiala retejo de IKEF estas www.ikef.infokaj ĉi tie vi trovos ĉion, kion vi scivolas pri IKEF. Bonvenon viziti nin rete!






- Kaj jen la Facebook paĝo de IKEF, vi povas komuniki kun ni ĉi tie: https://www.facebook.com/IKEF.JP/

- Ankaŭ mi metas ĉi tie la Facebook ligilon de nia IKEF Nordamerika filio:
- https://www.facebook.com/groups/674953286347164



Jen la fino de mia prezento, kaj mi esperas doni koran dankon al la materialkontribuantoj sube:

Honora prezidanto de IKEF, sro Roland Rotsaert;
Prezidanto de IKEF, sro Ĉielismo Wang Tianyi;
Vicprezidanto de IKEF, sro Ludviko Zhao Chenghua;
Vicprezidanto de IKEF, sro Yas Kawamura.

# Dankon al vi ĉiuj!